BEKkurso PEPAS

dennis keefe, www.bekkurso.info

8-D Integrighaj Ekzercoj por 8-A, 8-B, kaj 8-C

Parolekzerco I 8-B Bildo 8 – *La Kvar Katoj* (> 10 frazoj) pozitivaj frazoj

Tio estas lampo. Estas unu lampo sur la bildo. Tio estas katoj. Estas kvar katoj. Tio estas mushoj. Estas tri mushoj chirkauh la lampo. Estas unu musho dekstre de la lampo, kaj estas du mushoj maldekstre de ghi. KTP.

Parolekzerco II 8-B Bildo 8 – *La Kvar Katoj* (> 20 frazoj) pozitivaj kaj negativaj frazoj

Tio ne estas glasoj. Tio estas tasoj. Ne estas tri tasoj sur la tablo. Estas du tasoj tie. Tio ne estas glasoj. Tio estas boteloj. Estas du boteloj sur la tablo. KTP.

Diktajho I

Chu estas ses katoj sub la tablo? Ne, ne estas ses katoj. Estas kvar.

Diktajho II

Chu estas nauh tasoj sur la bildo? Ne, ne estas nauh tasoj tie. Estas kvin. Estas du sur la tablo, kaj tri dekstre de ghi.

Skribekzerco

Skribu Parolekzercon I auh II

Respondo (R) – Demando (D)

Konsilo al la kursgvidanto: vi donas mallongan respondon, kaj la lernantoj devas krei la demandon. Unua ekzemplo: R (de vi) = Tio estas lampo. D (de ili) = Kio estas tio? Dua ekzemplo: R = Super la tablo. D = Kie estas la lampo. Tria ekzemplo: R = Ramono. D = Kiu estas tiu? (auh, Kiu estas apud la tablo, ktp). Aliaj eblaj respondoj: 1. En Chinio. 2. Tre bone, dankon. 3. En la glaso. 4. Ghi estas urbo. 5. Ne, tio ne estas komputilo. 6. Jes, estas dek lernantoj en la kurso de Esperanto.

Demandoj fare de la gelernantoj (> 5)

Kiel, kio, chu, chu . . . auh, kiu, chu estas, kie